

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Pŝr 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 41. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Novembro, 1923.

ANNUAL MEETING OF THE AUSTRALASIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

The third annual meeting was held in Melbourne, on 21st September. There was a very satisfactory attendance of members. The president (Mr. A. R. Cohen), reviewed the work of the year, and expressed the hope that the same enthusiasm and willingness to assist would be shown during the forthcoming year. The secretary (Mr. G. Redfern) then read his report, which, omitting a few paragraphs for which space is not available, is as follows:—

"It might be well to review the hopes expressed in the last report, and the success or otherwise in fulfilment of same.

We mentioned the possibility of a second night of meeting in Melbourne, to enable us to reach all our members. This did not come to pass, but in its place our members have freely joined with suburban groups, and have helped to establish and maintain those young shoots. Members were urged to study, with the object of becoming efficient teachers of at least one group or class. To a small extent this has been done, but not sufficiently. Our central meeting in Melbourne has been a feeder for other groups, and this should still be our purpose. It was hoped that Adelaide would re-establish its groups. This was accomplished. Thanks to S-ro.

Waterman, Adelaide, is now affiliated with the Australasian Esperanto Association.

The year ended June 30th, 1923, was a notable one, in that during the year was held the fourth All-Australian Congress of Esperantists, under the presidency of S-ro C. W. Ballard. The work of managing and arranging the Congress, which was held in Sydney, naturally fell to the lot of Sydney members of the Australasian Esperanto Association. That it was successful goes without saying. Ninety-one Congressists attended, every State and New Zealand being represented, with the exception of Tasmania. Chiefly was it successful from a propaganda point of view, much publicity being given to our Movement.

Another notable event was the return of S-ro Hudson from an extended tour of Europe, in which he attended international congresses at Prague and Helsingfors, at each of which he acted as delegate from the Australasian Esperanto Association, accompanied at the latter by S-ro G. Gordon as fellow-delegate. Members should be pleased with the fact that we were again represented at an international congress, this time at Nurnberg, by a lady — F-ino Ely, and by S-ro Gordon.

A great advertisement for Esperanto was gained by its recognition at the State-schools Exhibition in Mel-

bourne. Thanks to the work and influence of S-ro Wallace, of the Education Department, a space was allocated for an Esperanto exhibit. Much valuable propaganda work was done.

A prize for an essay on Esperanto, in Esperanto, for Melbourne members, was won by F-ino Blyth, of the Mont Albert Group.

New Groups were formed, during the year, at Carnegie, E. Malvern, Lilyfield (Sydney), Melbourne Rationalist Association, Berwick, and Sandringham.

The Teachers' Conference, in N.S.W., carried a resolution favorable to Esperanto, but the Minister of Education was unfavorable to their proposal. The teachers in Victoria also had a resolution on the agenda, but this was not debated, owing to pressure of time. The number of teachers now interested in Victoria is an assurance of success when this resolution eventually comes before their Congress.

Arising out of a congress resolution that propaganda committees be formed in each State, meetings of secretaries of groups are now held in the rooms of the Australasian Esperanto Association, Melbourne.

A goodly sum was raised for the funds of the U.E.A. by the co-operative efforts of the A.E.A. and Melbourne Club.

Propaganda lectures were delivered by the secretary and president, and lectures on his experiences abroad were given by S-ro, Hudson, both in Melbourne and Sydney.

In Sydney, progress has been slow, but the full fruits of the Congress effort are not yet known. In other States and New Zealand, progress is also slow, in spite of efforts of enthusiasts.

It is due to all the officers of the Association to state that they have performed their work with unselfish zeal, and in every way possible, with limited time available, have done their best to forward the interests of the Movement and of the Association.

The report was duly received and adopted. Mr. H. Byatt was appointed Melbourne vice-president; Mr. Percy T. Hudson, secretary; Mr. G. Redfern, organiser, Mr. E. J. Cox, treasurer; and Mr. C. Kelly, librarian.

Clause 18 was deleted from the Constitution. This provided for amendments being made only at the annual general meeting. Any alterations and improvements may now be made at any time, if approved by a majority of the members.

After thanking the journal committee, which is responsible for the publication of "La Suda Krucio," the meeting concluded.

ĈIUJARA KUNVENO DE LA U.E.A.

La jara kunveno de la Universala Esperanto-Asocio, okazis la 24an de oktobro, en la kunvenejo de la Melburna Esperanta Klubo. Le Ĉefdelegito (S-ro. C. W. Ballard), raportis pri sia agado dum la pasinta jaro. Li ankaŭ informis la ĉeestantojn pri la nuna neforta stato de la societo, kaj klarigis, ke kaŭze de la mizerrega malriĉeco de multaj Eŭropaj membroj pli ol 25 pro cento de la tuta membraro en la lasta jaro devis esti eksigita pro nepago.

Sinjoron Rawson li dankis por la organizo de du koncertoj, (la unua en aŭgusto kaj la dua en oktobro), el kiuj li povis sendi al la Centra kaso la sumon de dek ses funtojn du ŝilingojn. La delegito ankaŭ dankis la bonvolemon de la geludintoj de la du komedioj prezentitaj kaj gratulis ilin pro ilia sukceso sur la scenejo. Anoj de la Australazia Esperanto-Asocio partoprenis en la komedio, "Angla Lingvo Sen Profesoro" kaj membroj de la Melburna Esperanta Klubo bone ludis "Cōnsilium Facultatis."

Poste, laŭ afabla invito, li parolis Angle al la tuta ĉeestantaro pri la objektoj kaj utilaj servoj de la Asocio kaj petis ilian helpo por trovi novajn anojn por anstataŭigi tiujn, kiuj en la nuna tempo ne povas finance subteni la Asocion.

En la Vatikano dum 1925, estos kunveno de konsilantaro, en kiu projekto unuigi ĉiujn kristanojn estos pridiskutata.

Post kiam la aliaj Balkanŝtatoj kaj Rusujo akceptis la Gregoran Kalendaron, Grekujo ankaŭ forigis la uzadon de la Juliana Kalendaro.

MALFERMU LA PORDOJN DE LA LERNEJOJ!

Daŭrigo.

Simile oni povas provi la gravan helpon de Esperanto por la aliaj fakoj; estas ja nur necese, ke oni rakontu, kion ni faras dum la esperanta instruado. Ni interparoladas, legas, tradukas, korespondas kun alilandaj geamikoj, kantas, ludas k.t.p. Historiajn verketojn, klasikajn literaturpartojn kaj fablojn, moralajn kaj klerigajn rakontojn enhavas nia esperanta legolibro. Entute ne ekzistas lerneja fako, kiu ne estas esperante pritaktata dum la esperanta instruado.

Plue mi montru alian utilon de esperanto! Ĉar la helplingvo estas tre



logika, la infanoj devas klare preni kaj kapti la penson, antaŭ ol ili elparolas ĝin. En la gepatra lingvo ili senzorge parolas kaj skribas ne ekkonanta la internajn reciprokojn interrilatojn de la ideoj kaj esprimoj. Sekve la esp. instruado devigas la infanojn logike pensi: ĝi akriĝas la intelekton kaj estas per tio la plej bona helpo por la tuta instruado.

Oni nun plue kontraŭdiros ke la instruado de aliaj fremdaj lingvoj havas la samajn sekvojn, la saman formalan instruon valoron. Al tiu opinio oni povus konsenti, se la lasta celo de

la lingva instruado, la plena scipovo de la fremdlingvo, estas ebla. Tiu-kondiĉe la instruado de fremdaj lingvoj estas rajta, kaj kontraŭbatali ĝin pro Esperanto estas granda eraro tre malutila al Esperanto; ĉar per tiu kontraŭbatalo la lingvaj instruistoj fariĝas niaj kontraŭuloj anstataŭ esti niaj plej kapablaj helpantoj. Sed en kiuj lernejoj la supre nomita celo, la plena scipovo de la lingvo, estas atingata? En la germanaj superaj lernejoj oni lernas krom la latina la anglan kaj francan lingvojn dum 6 aŭ 9 jaroj. Sed tamen nur malmultaj estas kapablaj, praktike kaj lerte uzi ilin en la fremda lando. Ankaŭ en la popolaj lernejoj oni havas fremdlingvajn kursojn, sed estas kompreneble, ke plena lernado estas tute nebla. Tial precipe por la amaso de tiuj gelnantoj Esperanto estas vera bezono. Per la lernado de Esperanto ni havas ne nur la gajnon de bonega formala klerigilo, sed ni atingas ankaŭ la plenan buŝan kaj skriban scipovon de lingvo, kiu estas parolata en ĉiuj partoj de la mondo. Ambaŭ valoraj rezultoj estas sufiĉe gravaj, por kaŭzi, ĉiu por si mem, la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Ili estas atingataj per pli malgrandaj penoj dum pli mallonga tempo.

Aukoraŭ kelkajn vortojn pri la korespondado! La internacia korespondado estas grava parto de la esperanta instruado ĝi estas kvazaŭ la unua praktika provo, la unua propra sperto por la efektiva valoro de Esperanto kiel internacia lingvo. Mi aranĝis la korespondadon por miaj gelnantoj kutime post duonjara instruado. Tiam la unua brulanta entuziasmo estas iomete moderegita per la necesa laboro kaj lernado, kaj nun la korespondado kiel nova incitilo estas bona. La korespondado estas diversa. La unua speco estas la korespondado kun alilandaj infanoj. Depost multaj jaroj mi ĉiam trovis alilandajn gekolegojn, kiuj havis la samajn dezirojn por siaj gelnantoj. Unue la infanoj letere babiladas pri

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn, ĈOKOLADOJN PER POŬTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.e., kostas 3s, (aldonu 6p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉokoladojn en kartonoj je 3s 6d ĝis 22s 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

simplaj aferoj, rakontas pri siaj famillianoj k. t. p. Baldaŭ kelkaj interŝuŝas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Ili raportas pri esp. festetoj; eĉ desegnaĵoj estas reciproke sendataj. La instruisto iom direktas la aferon, kaŭzas geografiajn kaj aliajn demandojn, kaj la ricevitaj respondoj helpas al la instruado.

La dua speco estas la korespondado de miaj gelearnantoj kun alilandaj plenkreskaj gesamideanoj, plejmulte geinstruistoj. Okaze de la internaciaj kongresoj mi trovis inter miaj alilandaj gekonatuloj afablajn gesinjorojn, kiuj havas grandajn meritojn tiurilate. La valoro de la korespondado kun tiaj plenkreskuloj estas malkompreneble tre granda. La ilustritaj kartoj estas bone elektitaj karakterizaj bildoj de fremdaj landoj, popoloj kutimaj, naciaj kostumaj k. t. p. La teksto enhavas valorajn instruigaĵojn klarigojn en bona Esperanto. Tiu amika helpo de alilandaj gekolegoj estas granda ofero, pro kiu infanoj kaj instruistoj ŝuldas koran dankon.

Pruvi la valoron de Esperanto por la lernejo rilate al moralaj kaj homaranoj vidpunktoj, tio estas aparta bona tasko.

La ĉefan enhavon de mia skizo mi esprimas resume per jenaj frazoj: 1. La instruado de Esperanto helpas la plenan lernadon de la gepatra lingvo. 2. La instruado de Esperanto helpas kaj apogas la realajn instruajn fakojn. 3. La instruado de Esperanto devigas la infanojn, pensi logike kaj estas tial bona akirgilo de la intelekto. 4. Entute: Esperanto ne estas plipezigo kaj plimalfaciligo sed grava helpo de la lerneja laboro. La tempon kaj forton, kiujn la infanoj bezonas por la lernado de Esperanto, ili double regajnas pro la akirita ĝenerala klero kaj instruisteco.

Ni zorgu, ke la kontraŭuloj eksciution!

[La supra artikolo estos interesa por Aŭstralianoj, ĉar per la lumbildoj de S-roj. Pyke kaj Rawson ili ofte vidis la verkinton, lian lernejon kaj lernantojn. Pri la vizito al la lernejo la sinjoroj diras,—unu el la plej plezurplenaj tagoj, kiujn ni pasigis en Eŭropo estis tiu en kiu ni vizitis ĉi-tiun lernejon.—Red.]

NEKROLOGO.

Richard Sharpe, ("Ro Ŝo"), mortis ĉe la domo de sia filo je la 1a de aŭgusto. Pro "Travivaĵoj" ni ĉiuj konsideris lin bone konata amiko. Li ĉeestis multajn kongresojn kaj ĉiam bone laboradis por nia movado. Ni tre sincere bedaŭras lian morton.

Sinjoro William Macdonald, M.A., tre konata Melburna samideano mortis antaŭnelonge. Li estis tre helpema al junaj lernantoj kaj li pli ol unu foje gastigis la samideanaron ĉe sia hejmo apud la maro ĉe Black Rock. Li havis tre fundan scion de nia lingvo, kaj ŝatis verki en ĝi mallongajn historiaĵojn kaj poeziojn. Al li "La Suda Kruc" ŝuldis "La Vilaga Lernejnabo." Legantoj de "The Esperanto Guide" memoros, ke li tre helpis la aŭtoron, S-ron. Hyde, en la legado de la presprovaĵoj. Al la parencoj de nia mortinta kunbatalanto ni etendas niajn plej sincerajn kondolencojn.

Jus ni ricevis la bedaŭrandan informon, ke nia samideano, distrikta ekspolcano en Saltdalen, Johan Lorentz Normann, mortis la 4an de aŭgusto en sia 101½ vivjaro.

Li estis dum sia tuta vivo viro kun multaj interesoj. En aĝo de 84 jaroj li komencis lerni Esperanton kaj du jaroj poste li kun sukceso partoprenis en stila konkurso en nia lingvo. Dum multaj jaroj li estis membro de N.E.L. kaj je sia morto li certe estis la plej maljuna Esperantisto en la mondo.—("Norvega Esperantisto.")

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET

— PRAHRAN —

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K.—Nova kurso komenciĝis en Bankstown (antaŭurbo de Sidnejo), sub gvidado de S-ro. Edgar Pryke. Lernantoj kunvenas ĉiusemajne.

Dum oktobro unu el la amuzajoj ĉe la Sidneja Esperanto-Societo, estis ŝercproceso dum kiu kelkaj respektindaj membroj de la klubo energie defendis sin kontraŭ teruraj akuzoj inter oftaj laŭtaj ekridoj de la aŭdantaro. Kiu deziras esperantan advokaton skribu al Sidnejo kaj humoro certe ne forestos.

"La Angla Lagdistrikto" estis la temo de lumbilda esperanta parolado farita de la prezidanto de la Sidneja Esperanta Societo en kunveno de tiu ĉi societo je la 18a oktobro. Li klare montris kiel bona organizado kaj spirito de frateco povas pli valorigi libertempon preskaŭ centoble, ĉar sub la gvidado de du libertempaj societoj S-ro. Taylor estis rigardinta ĉiun gravan lagon kaj suprengrimpta ĉiun altan monton en plejbona cirkonstancoj kaj dum plej mallonga tempospaco.

Nenie en la Britinsuloj troviĝas tiel multe da pitoreska pejzaĝo en tia kompare malvasta spaco kiel en la laga distrikto de norda Anglujo. Ĉiufanke la vizitanto vidas pacajn valojn, malglatajn montojn kaj ĉarmajn lagojn. Tie ĉi la poetoj kaj literaturistoj trovis kvietecon. Tennyson, Wordsworth, Shelley, Southey, Ruskin, kaj Mrs. Hemans laboradis kaj ricevus inspiron el la mirinda atmosfero de la montaj kaj valoj.

Per helpo de 60 lumbildoj, la parolanto priskribis la gastodomojn de la "Holiday Fellowship" kaj "Co-operative Holidays Association" kaj la (kelkfoje komikajn) aventurojn de la gastaro sur vojo kaj deklivo. Inter la gastaro ĉiam regis kamaradeco kaj amikeco ĉu dum la ekskursoj ĉu dum la vesperfestenoj en la gastodomo, kvankam plejmulte el la gastoj ne konatiĝis antaŭ la libertempoj kaj disigis al ĉiu parto de la lando poste.

CARNEGIE, V.—Jaŭdon la 4a de oktobro, Sinjoroj Byatt kaj Hudson faris propagandan paroladon ĉe la Carnegie filio de la Oranĝa Loĝio, laŭ aranĝoj de la sekretario de la Carnegie Esperanta Grupo, F-ino. W. Irwin.

La aŭskultantoj interesiĝis, kaj kelkaj studos la lingvon, kaj multaj volonte aĉetis la libretojn portatajn de S-ro. Byatt.

MELBURN, V.—La Melburna sekcio de la A.E.A. iom ŝanĝis sian agadmanieron. Post malfermo de la kunveno akurate je la oka, oni sin metas en grupojn por komencantoj, por tiuj iom pli progresintaj, por tiuj, kiuj studas por la provekzameno de la B.E.A., por tiuj, kiuj volas gajni la diplomon, kaj, fine, konversacia grupo de tiuj, kiuj volas pliperfektigi sin en la parolado. Je la naŭa, aŭ iom poste, ĉiuj kolektiĝas en unu grupo por aŭskulti prelegon laŭ aranĝita temaro kaj antaŭ ol la disigo estas kelkaj minutoj por agrabla esperanta kantado.

La aranĝita temaro estas kiel sekvas:—Nov. 16, Stamp Collecting, S-ro. C. L. Clarke; Nov. 23, Translation Evening, S-ino. Bigelow; Nov. 30, Propaganda Work, S-ro. G. Redfern; Dec. 7, Music and Singing, Membroj; Dec. 14, Esperanto Literature, S-ro. C. W. Ballard; Dec. 21, Esperanto in Europe, S-ro. P. T. Hudson.

Dum oktobro la Melburnaj kaj Sidneja samideanoj havis la plezuron bonvenigi S-ron, George Gordon, kiu havis multon, por diri pri siaj vagadoj tra Eŭropo dum la lastaj du jaroj. Li ĉeestis la XIV kaj XV kongresojn kaj renkontis multajn eminentulojn en Esperantaj kaj aliaj rondoj. Nia samideano nun iras al Nov-Zelando por la somera sezono. Antaŭ ol li foriris, li faris aranĝojn por la restarigo de "La Suda Kruco" traduka kurso. Antaŭaj kursanoj kaj tiuj kiuj volas nun partopreni, sin turnu al la kondukanto, poŝtkesto 1367, strato Elizabeth Poŝtoŝicejo, Melburno.

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
—First Class Table.—

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

RECENZO.

El La "Camera Obscura," de Hildebrand, el la Holanda originalo tradukis H. C. Mees. Internacia Mondliteraturo Volumo 5, eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Kvankam la Holandanoj kaj la Angloj reciproke sin konis dum multaj jarcentoj, strange estas, ke preskaŭ nenio el la Holanda literaturo estis tradukita anglan. Tiu ĉi elĉerpaĵo el la verkoj de Nikolao Beets, kiu sub la pseŭdonimo, "Hildebrand" verkis poemojn dum sia junaĝo kaj poste, kiam li estis universitata profesoro, pritraktaĵojn pri temoj edifaj kaj literaturaj, montras ke la arto de la verkanto de la mallonga historieto estas la sama en ĉiuj mondpartoj. Pri la "Camera Obscura" la tradukinto en sia antaŭparolo diras ke ĝi "okupas en la Nederlanda literatura unikan lokon. Ĝi estas kolekto de rakontoj kaj priskriboj de delikata kaj ofte sprita spirito, sed havas grandparte tre naciĝn koloron . . . la majstra verko estas ankoraŭ nun legata . . . kaj neniu alia verko atingis tiel ĝeneralan ŝatatecon." Kvankam la nunaj eliraĵoj ne gajnis por la verko la titolon, majstran verkon, ili estas tre legindaj kaj provizas konvenan legaĵon por la pasanta horo. El la tri rakontoj, eble la tria—Malnova konato—kiu priskribas la neentenditan viziton de malnova konatulo al amiko en lia somera loĝejo, dum li estas ĉirkaŭita de siaj iom malĝentilaj idoj, estas la plej amuza. Samtempe, ĝi enhavas moralon kiu meritas la atenton de gepatroj kaj infanoj kie ajn ili estas. (C. W. B.)

(Ĉiu recenzata libro estas mendebla, ĉe A. E. A., Melbourne.)

FILATELO.

En la nuna tempo la Aŭstraliaj 1d. kaj 1½d. poŝtmarkoj ambaŭ estas verdaj. Tiu estas tre ĝeniga afero, kaj al oficistoj, kaj al uzantoj. Laŭ oficialaj informoj la nuna duonpenco poŝtmarko estos tuj anstataŭigata de prunkolora eldono, kaj, kiam la nuna provizo de la 1½d. valoro estos elĉerpita, la koloro estos ŝanĝata en malhelan ruĝon. Multaj proponoj estis faritaj, ke la dezegno estu aliigita, sed la departemento ĉiam silentas rilate tiun punkton.

ZAMENHOF'S BIRTHDAY AND THE MONUMENT FUND.

Australian Esperantists will be pleased to know that £40 has been sent from here to the treasurer of the Monument Fund. Fifty pounds (sterling) of coupons were sent out, so there is still £10 to be collected. Could we not, on the occasion of the birthday anniversary of the Majstro, purchase a shilling coupon? A third of the £40 sent was subscribed by persons who are not Esperantists, but whose sympathies were awakened by their Esperanto friends. Make the fund known to your friends, and send for coupons to J. G. Pyke, 212 Swanston Street, Melbourne.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA.

Partoprenis ĉe la fakaj kunsidoj dum la XVa Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg, oficiala delegito de la Universala Komitato de vastegea organizo: La Tutmondligo de Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (Y.M.C.A.), kiu enhavas preskaŭ 9000 lokajn grupojn kaj proksimume 2 milionojn da membroj en ĉiuj partoj de la mondo. Ĝi nun estas konstante reprezentata en la Kristana Esperantista Ligo Internacia per sia delegito S-ro. R. Horner, kiu feliĉe estas fervora kaj entuziasma Esperantisto. La Ĝenerala kunveno de la K.E.L.I. konfirmis kiel oficialan organon "Dia Regno" kaj elektis specialan agadkomitaton kun jenaj tri anoj: P. Hubner, Bergstrasse la Quedlinburg (Germanujo); H. A. Luyken, 23 Arcadian Gardens, Wood Green, London N 22 (Anglujo); R. Horner, 3 Rue General Dufour, Genf (Svisujo).

PRI LINGVAJ AFEROJ

Depost la antaŭjara Kongreso la Sekcio por la Komuna Vortaro daŭrigis labori senbrue kaj sendanke laŭ sia kutimo ĝi preparis kaj starigis la Trian Oficialan Aldonon, kiam la L. K. poste aprobis kaj oficialigis.

Baldaŭ aperos ankaŭ plena oficiala radikaro kun revizitaj kaj korektitaj naciilingvaj tradukoj kaj kun Esperantlingvaj difinoj, kompletigantaj la Vortaron de Kabe. La unua kaĵero enhavas la anglan, francan kaj germanan tradukojn.

Sciencaĵ studoj pri la problemoj de la pseŭdosufiksoj kaj pri tiu de la internaciaj vortoj estas komencitaj, same kiel preparaj esploroj por la internacia kolektado kaj tradukado de proverboj, komparoj kaj metaforoj.

La Komunvortara Sekcio, konstante kun ĉagreno, ke la plimulto de la verkantoj ne observas la ripetitajn konsilojn de Zamenhof kaj de la Akademio, denove rememorigas al la Esperantistaro siajn antaŭajn admonojn kaj insiste petas, ke neniu enkonduki ian novan radikon aŭ formon, antaŭ ol li estos konsultinta ne nur unu lingve kleran kaj spertan Esperantiston, sed kelkajn malsamlingvanajn kompetentulojn.

Por faciligi tiun ĉi konsultadon, kium Zamenhof opiniis kaj ofte deklaris tute necesa, la Sekcio tuj starigos diverslingvanan komisionon, kiu prenos sur sin la taskon, ekzameni la publikigotajn verkojn kaj vortarojn, kiujn oni prezentos al ĝi.

Tiamaniere la aŭtoroj bezonas nur sin turni al la Direktoro de la Komunvortara Sekcio, 51 rue de Clichy, Paris IX, kiu transdonos la ekzamenotan verkon sinsekve al la diversaj difinitaj kompetentuloj.

La ekzameno ĉiam fariĝos senprokraste kaj kiel eble plej rapide, kaj la atesto de tiu kontrolo kaj korektado certe estos valora rekomendo apud la publiko. En ĝi kuŝas la sola rimedo, por kontraŭstari la danĝerigan emon de tiuj, kiuj senĉese kaj senpripenso novajn internacie nekompreneblajn radikojn aŭ esprimojn uzas simple pro tio, ke ili tiamaniere pli rapide kaj pli senpene tradukas ian naciaĵon.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, jul.-aŭg.; Bulgara Esperantisto, aŭg.; Esperanto Triumfonta, n-roj 151, 2, 4, 5, 7; Itala Esperanta Revuo, aŭg., sep.; La Interligilo de I.P.T.T., jun., aŭg.; La Unuigita Tuthomaro, jul.-aŭg.; La Verda Ombro, jun.-jul.; Sennacieca Revuo, aŭg.-sep.

Esperantio, n-ro, 2; Internacia Stenografisto, sep.; Norvega Esperantisto, jun.-jul.; La Espero, jun.; La Nova Epoko, apr.-jun.; Litova Stelo, jul.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 26a oktobro ni ricevis la jenajn sumojn:—J. T. Downey, 9/-, ĝis junio, '24; Petro Dean, 5/-, ĝis junio, '24; W. Richardson, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; W. L. Waterman, 4/6, ĝis junio, '24; S. Polotynski, 4/6, ĝis julio, '24; —, Dadswell, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; P. Wyatt, 10/-, ĝis julio, '25; E. W. Wheeler, 5/-, ĝis julio, '24; F. Trewin, 4/6, ĝis septembro, '24; S. J. Leberg, 9/-, ĝis majo, '24; F. T. Hepworth, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; W. H. King, 4/6, ĝis julio, '24; M. Hollow, 4/6, ĝis junio, '24; F. Koeppen, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; Fred Halliday, 10/-, ĝis julio, '25; F. T. R. McArdle, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; E. A. Budge, 5/-, ĝis majo, '23; H. R. Smith, 5/-; H. N. Love, 4/6, ĝis julio, '24; A. H. McPhie, 9/-, ĝis julio, '24; E. M. Wallace, 5/-, ĝis julio, '24; Nigra Cigna Grupo, £1/9/3, ĝis aŭgusto, '23; F. Tondut, 4/6, ĝis junio, '24; E. Lee, 4/6, ĝis majo, '24; F. J. Ryatt, 4/6, ĝis septembro, '24; C. Unwin, 7/6, ĝis februaro, '24; C. W. Beard, 5/-, ĝis septembro, '24; T. E. O'Donaghue, 4/6, ĝis junio, '24; C. Dahl, 9/-; A. J. Hanks, 4/6, ĝis septembro, '24; kontantaj vendoj, 20/-; Hobarta Esperanta Grupo, 5/6, ĝis aŭgusto, '24; Nigra Cigna Grupo, 5/6, ĝis aŭgusto, '24; Dargaville Esperanta Asocio, 5/6, ĝis septembro, '24; S. Polotynski, 1/-; Whangarei Esperanta Grupo, 5/6, ĝis septembro, '24; Australazia Esperanta Grupo, 5/6, ĝis aŭgusto, '24; Berwick Esperanta Grupo, 2/9, ĝis februaro, '24.

GARANTIA FONDO.

J. T. Downey, 1/6; Petro Dean, 5/-; A. Martin, 3/-; M. Hollow, 5/6; A. H. McPhie, 6/-; Ethel Lee, 5/6.

BONAJ DENTOJ

B

ONA SANO
ONA ODORA SPIRO
ONA RIDO
ONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro, E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

La Suda Kruro

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 42. Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Decembro, 1923.

IS ESPERANTO REALLY NEEDED?

"Language remains the worst frontier in Europe; the most complicated, the most impassable, the hardest to adjust, the most fertile in conflicts and hatred."

So writes Professor A. L. Guérard, in "The National Geographic Magazine" of America.

Western Europe, that is, Europe minus Russia—a region (as we all know) much smaller than Australia—rejoices in the possession of some forty languages (not including innumerable local patois), which are taught in schools, used in printing books and newspapers, and, even in cases where they are not officially established, are strong enough to create a "language question" which is capable of giving rise to violent events.

Two hundred miles is more than the distance from Sydney to Canberra, Melbourne to Albury, Brisbane to Bundaberg—a matter of five hours in a moderately fast train. Soon we shall think of it as a two-hour ride in a commercial aeroplane.

"If," says Professor Guérard, "with any one of the European capitals as a centre (with the exception of Rome) you draw a circle 200 miles in radius, you will find that at least four different languages are reached. Such a circle forms very restricted bounds for the scientist or business man.

"And it is indeed a prison. Beyond its wall reign incomprehension, diffi-

dence, hatred. If a man lands on the wrong side of the language boundary, the very accent of his speech marks him for a foreigner, frequently for an enemy. He is fair game for the crook and an object of suspicion to the police.

"The telephone turns into a mockery. What is the use of being connected with Berlin and Rome if you can't speak German or Italian? The telephone is pitiless for strangers whose pronunciation is imperfect. It is not always easy to get the right number even in your own language, but with the added handicap of a foreign accent, the case is well-nigh hopeless."

Matters would be quite bad enough, even if the people using each of these numerous languages were segregated so as to form well-defined linguistic units, but—

"Confusion grows worse confounded when, instead of forming a patchwork or mosaic of self-contained elements, populations of different speech jostle one another in the same territory. No map can do full justice to such a situation, the result of conquest, migration, or infiltration."

Frequently the dominant population belongs to one linguistic group, the common people to another; sometimes with strange results. Thus it has come to pass that at Salonika, as at Constantinople, the language in which the best schools are conducted and the

leading newspapers are published in French.

And these linguistic groups in the Old World tend to become more and more tenacious of their ancestral tongues as time goes on.

"Many nations have revived and struggled for recognition, for the last hundred years; and every little group, as soon as it acquired consciousness, became loudly assertive and exclusive. *Sinn Fein* could be the motto of all the national revivals in recent history.

"Nationalism has no doubt been a great power for good, but it has also exacted a heavy price. In reviving the Czech language as a vehicle of culture, the Bohemians erected a new barrier between themselves and the rest of the world. Catalonia is the most active part of Spain, and the Catalan language has a noble tradition; yet it seems a pity that this sturdy, progressive population should not be satisfied with Castilian, a language of world-wide availability.

"The Irish Free State will not let the Irish language fade away; it may even require every loyal Irishman to burden his mind with that venerable and impracticable instrument.

"In 1830, French was practically the culture language of all the Belgians. But the Flemings would have no peace until they had secured for their Dutch dialect full equality with French, thus creating a linguistic barbed-wire fence through a country about as large as Maryland and Delaware together.

"France had repeatedly threatened the independence of Belgium, and Flemish belongs to a different family from French, so there is some justification in the hostility of the Flemings to the supremacy of the French language.

"These reasons do not exist in the case of Rumanian. There was no Rumanian literature until half a century ago. French was the current language for all educated people in Rumania; only French was heard in the salons and theatres of Bucharest, and even in the corridors of the National Parliament.

"French and Rumanian are cognate languages, and there is not the slightest danger that France would ever threaten the political or economic independence of Rumania. It seems as if the wise thing to do would be to

adopt French as the official language of the new state.

"But that was incompatible with the fierce pride of a new nationality, which must have all the appurtenances of its dignity—a dynasty, a diplomacy, an army, a navy, a language. So, without any feeling of hostility toward France, patriotic Rumanians began deriding and even mishandling the *Bonjouristes*, as they called their Frenchified aristocracy.

"One of the most curious instances of this craving for national differentiation, this "Ourselves Alone!" in the linguistic domain, is provided by the Norwegians. It seems bad enough that Scandinavian, spoken in five countries (Sweden, Norway, Denmark, Finland, and Iceland), should be divided into at least two branches, which a peculiar accentuation makes noticeably different.

"We might desire to see the rise of a Pan-Scandinavian, over-riding local idioms, in the same way as the King's English is superseding provincial forms. But Norway has chosen another path. She was getting along well enough with Danish as her official language, when some patriot discovered that the use of Danish was the badge of previous servitude. So, against Danish, or *Riksmaal*, a new "national" tongue was set up, the *Landsmaal*. This, although it calls itself the Norwegian Popular Language, is an artificial combination, a composite dialect, on the basis of old Norse peasant patois. It is not spoken spontaneously anywhere, but it is taught, it is gaining ground, and it may become the sole medium of expression in Norway.

"Thus an obstacle deeper than the Skagerrack will be created between two sister countries which, even combined, would form too small a culture group."

Professor Guérard is already known to us as a supporter of the international language idea, and in this article he reaffirms his belief in that solution of the formidable problem of diversity of language. While he heartily approves of the preservation of existing natural languages, and even dialects, and explains the aesthetic and social purposes they serve, again he declares that an international means of communication, in addition thereto, has become an imperative necessity.

A RESOLUTION THAT WAS NOT ACCEPTED.

Of the resolutions of the Commission for Intellectual Co-operation, the only one that was not accepted by the League of Nations was that which recommended the instruction of foreign languages in preference to an artificial world-language. A number of delegates, among them Lord Robert Cecil, found that resolution unacceptable, on account of the great progress of Esperanto during last year — an instance being the action of the Brazilian Parliament in establishing examinations in Esperanto in all normal schools.

ITALIAN MINISTRY OF COMMERCE FAVORABLE.

At the Italian Esperanto Congress at Terni, where the Government and also the Ministries of Education, Public Works, Economy, the Colonies, War and Marine were represented it was announced that the Ministry of Commerce and Industry had permitted the teaching of Esperanto in Royal Commercial Schools.

A letter signed on behalf of the Minister, and addressed to all Royal Commercial Schools, was read at the Congress.

THE POLICE AND ESPERANTO.

This is an international age, and operations of criminal organisations often extend to several countries at once, like those of many more laudable institutions. Consequently the detection and prevention of crime also assume an international character. One example of this is the labours of the League of Nations for the suppression of the "white slave" traffic and the traffic in dangerous drugs.

Another example is the International Police Congress recently held in Vienna, where many matters of close concern alike to well-doers and

to evil-doers were discussed. In the discussions the old difficulty of diversity of language was once again felt, and the Congress was the more ready to hear the representations of the delegate of the World-wide Police League, a voluntary organisation which makes much use of Esperanto, who recommended the more general use of the simple international tongue.

A committee was appointed, and decided in favour of the language by a large majority, which included certain members who had come to scoff and remained to advocate Esperanto.

The Police League, which has its headquarters in Budapest, publishes a journal entirely in Esperanto, which is announced as dealing with "criminal matters, secret languages, sects and written codes," with regular news of various undesirable traffics, and with original articles on the most striking criminal cases.

FINNA SAMIDEANO ALVENAS.

Du el la Melburnaj grupoj havis la plezuron akcepti Finnan samideanon, sinjoro Lauri Laiho, kiu venas loĝi en Aŭstralio. La afabla vizitanto jam starigis sian tendon en Melburno.

Ĉe la kunvenoj sinjoro Laiho faris interesan paroladon pri sia lando kaj pri la valoro de Esperanto al vojaĝanto. El tiuj paroladoj tre profitis la grupanoj, tiel pro la flua, bonstila Esperanto, kiel ankaŭ pro la klara, preciza prononco de la vokaloj. Pri tiu lasta punkto ni Aŭstralianoj, kiel ĉiuj Anglosaksonoj, tre bezonas instruon kaj ekzercon.

Bonvenon, Sinjoro, al la Lando de la Suda Vento!

REVENO DE GESINJOROJ DRUMMOND.

Reveninte el la Meko de la Esperantistoj—la XV-a universala Kongreso en Nürnberg—du tre malnovaj kaj fervoraj samideanoj, sinjoro W. J. Drummond kaj sinjorino M. Drum-

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn. ĈOKOL ADOJN PER POŝTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.e., kostas 3s. (aldonu 6 p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉoko ladojn en kartonoj je 3s 6d ĝis 22s 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

mond, atingis Melburnon en la 16-a de novembro. Sinjoro Drummond, prezidanto de la Melburna Esperanto-Klubo, estas unu el la pioniroj de Esperanto en Melburno, kaj sinjorino Drummond estas de multe da jaroj entuziasma probatalanto de nia lingvo.

La vojaĝintoj ne nur alestis la kongreson, sed ankaŭ vizitis, uzante nur Esperanton, pli ol tridek urbojn en Eŭropo. En multaj lokoj sinjoro Drummond faris paroladon pri Aŭstralio de la vidpunkto de la eventuala migranto, kun helpo de lumbildoj, kies klišojn pruntis al li la Alta Komisaro de Aŭstralio en Londono. Tiuj paroladoj havis grandan sukceson, precipe en Lyons (Francujo), kie la Ĉambro de Komercio disponigis por la kunveno specialan salomon. Ne nur valora servo al Aŭstralio estas tia agado, sed ankaŭ nova refuto de la malnova kalumnio, ke Esperanto estas kontraŭpatriota.

Kun profunda entuziasmo la revenintoj parolas pri la XV-a kongreso, de kiu sinjoro Drummond havis la honoron esti vicprezidanto, kaj pri ĝiaj neforgeseblaj memoroj. Kvin mil homoj el pli ol 40 nacioj, parolantaj per komuna lingvo kaj kun perfekta kompreno . . . ; la temo ne estas nova, tamen ĉiam inspiranta, kaj ni ĥejmestantoj povas plenrajte envii al gesinjoroj Drummond la ĝojon konstati tiun miraklon per propraj okuloj kaj oreloj. Ni ja nur povas diri: "Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis kaj tamen kredas!"

Kun doktoro Privat sinjoro Drummond rakontas pri interesa, kelkhora konversacio. Pri la energio kaj kapablo de Privat sinjoro Drummond estas tre impresita, kaj lin nomas "la animo de la Esperanta movado."

GESINJOROJ DRUMMOND PAROLADOS.

En merkredo, 12-a de decembro, en la Australian Church (Aŭstralio Preĝejo), Melburno, gesinjoroj Drummond faros paroladojn en Angla linvo pri

sia vizito al Eŭropo.

Ambaŭ estas spertaj kaj spritaj parolistoj, kaj la paroloj estos vere aŭdindaj. Espereble prezidos la kunvenon Sir Aleksandro Peacock, ministro de popola instruado de la provinco Viktorio.

SONETO.

De Raffaello Santi.

Ho am', ho am', vi logis min al reto
per la okuloj, kies bril' doloras,
per neĝaj vangoj, kie rozoj floras,
per dolĉa vort' kaj nobla etiketo.

Jen flam' en mi! Estingas ĝin nenio,
nek la river', nek mar'. Sed mi ne
ĝemas.

Volupto tia en ĉi ardo tremas,
dum ĉiam pli konsumas min pasio.

Ho, estis dolĉa jugo, dolĉa ĉen'
neĝblankaj viaj brakoj ĉirkaŭ kolo.
Malligis vi — jen mia kor' en sven'.

Pri la ceteraj ĉesu la parolo,
ĉar dum la cit' mortigus min ĉagren',
nur mute do mi pensas vin en solo.

El itala tradukis K. de Kalocsay.

ESPERANTISTO ELTROVAS GENIULAN MUZIKAN JUNULON.

Nia samideano, S-ro. Stefan Polotynski, konatigis en Sidnejo kun infano, kies lerta ludado de la piano estas rimarkinda. S-ro. Polotynski intencas plue instrui kaj poste konduki malgrandan Jimmy Walker al Londono kaj aliaj centroj de muzika kulturo en Eŭropo. La knabo estas nun dekunu-jara kaj ludas la pianon de post sia kara jaro. S-ro. Polotynski jam arangis serion da koncertoj en Polujo. Li volas, ke Jimmy fariĝu ne nur pianludulo sed ankaŭ kondukisto kaj komponisto, kaj li estas certa, ke la knabo iam estos famulo.

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET
— PRAHRAN —

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

RECENZO.

Esperanta Alfabeto kun Bildoj, de E. A. Pryke, D.B.E.A., Bankstown, apud Sydney, N.S.W., Aŭstralio; ilustrita de George Collingridge d. Tourcey, K.B.E.A. Ĉe Presejo G. Collingridge, Hornsby, N.S.W., Aŭstralio. Prezo: kvin ŝilingoj.

Kun feliĉa rezulto kunlaboris du eminentaj samideanoj por produkti ĉi tiun belan kaj utilan a-b-c-libron. Sinjoro Collingridge estas jam distingita studanto kaj verkisto pri antikvaj vojaĝoj al Aŭstralio, kaj egale bone konata pro sia senlaca laborado pri la arto, precipe pri la pentrado. Sinjoro Pryke de multe da jaroj sindone laboras je la ne malpli valora, praktika flanko de nia movado.

La libro konsistas el la alfabeto de nia lingvo kun konvena verseto por ĉiu litero (krom la malfeliĉa ŭ, kiu neniam komencas vorton), artoplane ilustrita per la talento de sinjoro Collingridge.

D estas dando
diligente dancanta;
E — elefanto
energie kuranta.

Ja malafabla estas tiu, kiu ne volas lerni per tia agrabla metodo!

La bildoj kun la akompanantaj versetoj estas originale kaj trafe desegnitaj en blankaj linioj sur fonoj de diversaj nuancoj de viola koloro; ili estas muntitaj po du sur unu paĝo sur palverda papero. Pri la harmonio de la tonoj ne malpli sukcesis tia artisto, kia sinjoro Collingridge, ol pri la trafeco kaj facila memoreblo de la versetoj—tia praktika instruisto, kiel sinjoro Pryke. Al ambaŭ samideanoj ni kore gratulas.

La libro taŭgas, kiel por donaco, tiel ankaŭ por zorga konservado, kaj nepre ĉiu lernanto, kiu ĝin trarigardos, almenaŭ iom lernos, eble eĉ ne sciante, ke li lernas. Ple, ĉer la libro konsistas el "artist's proofs" (provaĵoj de artisto), ĝi havas nuntempe multan valoron.

Du-tri erarojn oni devas bedaŭri, precipe en libro, kiu trafas en manojn

de komencantoj: "signifikanta" anstataŭ "signifanta," "komencas" anstataŭ "komencas," kaj "majestro" anstataŭ "majstro."

(A. D.)

Legendoj, de A. Niemojewski, tradukita el la pola originalo de B. Kuhl, kun antaŭparolo de Antoni Grabowski: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

La antaŭparolo klarigas, ke la aŭtoro estas talenta nuntempa pola verkisto. Li multe vojaĝis en Oriento, kaj komencinte kiel artiso transformiĝis iom post iom en scienciston kaj dediĉis sin fine al la kompara esplorado de religioj. "La nuna libreto konsistas el kvar poeziaj rakontoj el la vivo de Jesuo, sed tiu ĉi nomo, kvankam li estas la ĉefa heroo, nenie estas dirita, sed lasita al la konjektemo de la legantoj. Li kaj lia granda verko estas traktataj diskrete kaj ili formas nur la kondukkan fadenon de serio da koloraj morbidaj el tiu epoko, . . . Kvankam la temo estas elstuditaj, la novelista talento de l'aŭtoro brilas en la legendoj plenforte. La tutaĵo vivas kaj impresas potence la animon de la leganto." Kial fama liberpensulo elektis ĉi tiun temon estas malfacile kompreneble. Ĉiu leganto tuj vidos, ke la temo venas el la Nova Testamento, kaj ĉar la nuna verko variigas la vortojn sed neniamaniere ŝanĝas la instruon, oni povas facile imagi, ke la legado de "Legendoj" havus la rezulton, ke, se la leganto antaŭe forgesis legi sian Biblion, li denove rapidos al la ĝuoj de la Sankta Libro.

(C. W. B.)

Mas'infaka Esperanto - Vortaro Prielementa, Eugen Wüster Internacia mondliteraturo, volumo 2, eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Ĉi tiu malgranda libro estas de la plej granda valoro. Ĉiu, kiu volas korekte uzi la Esperantajn ekvivalentojn de teknikaj vortoj bonvenigos ĉi tiun vortaron. Kvankam la Esperantaj vortoj estas tradukitaj en Germanan lingvon la libro estas utila al Esper-

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
— First Class Table. —

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

antaj verkistoj de ĉiu nacio. La preskostoj kaj grandeco de la libro estis limitaj per tre simpla sed tre praktika ideo pri la uzo de referencaj numeroj elpensita de d-ro Dietterle. La kompilinto diras, ke li prezentas nur jam uzitajn kunmetaĵojn; novajn radikojn li ne bezonis enkonduki. La vortoj ĉi tie donitaj troviĝos pli aŭ malpli en ĉiu faka vortaro kaj tre faciligos la laboron de ties kompilantoj.

(C. W. B.)

EN LA FRUAJ TAGOJ.

De D-ro Kazimierz Bein (Kabe).

En la jaro 1887, kiam aperis la unua broŝuro de D-ro Esperanto, mi estis liceano en Varsovio. Una el miaj kolegoj, S. D., granda ŝerculo, aĉetis la lernolibreton, legis ĝin al ni dum la paŭzoj inter la lecionoj kaj uzis sian tutan spritecon por moki la lingvon kaj precipe kelkajn sufiksojn, kiujn li trovis—maldecaj. Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi partoprenis kaj subtenis la mokojn kaj ĉar mi estis bona latinisto, mi forte kritikis la lingvon, en kiu mankas, interalie, tiaj formoj kiel *futurum exactum* kaj *plusquamperfectum*. Tamen la versaĵoj ĉarmis min kaj dum kelke da tagoj senĉese “en sonĝo principon mi vidis.” Post kelke da semajnoj mia kolego S. D. forĝesis pri la maldecaj sufiksoj, mi pri la principo. La leganto ne juĝu nin tro severe: ni estis junaj, la vetero estis bela, ne estas do mirinde, ke la boatveturado sur Vistulo allogis nin pli forte, ol nova lingvo: ĉu ne sufiĉe jam tedis nin la antikvaj!

Pasis 16 jaroj. Kiel abonanto de la angla “Review of Reviews” mi legis tie kun intereso la esperantan kronikon, sed post kelke da monatoj ĝi komencis inciti min. “Kia diablo estas tiu Esperanto, kiun faris en Varsovio iu D-ro Zamenhof, okulisto, same kiel mi?” Mi aĉetis la unuan malgrandan broŝuron de D-ro Esperanto por Poloj, mi prenis de kolego (li tiam ne estis ankoraŭ Esperantisto) la jarkolekton 1896 de “Lingvo Internacia” kaj post kelke da tagoj, ĝustadire post kelhora laboro, mi jam libere komprenis ĉiajn esperantajn tekstojn sen helpo de vortaro.

Mi jam konis la novan lingvon, mi ekdeziris koniĝi kun ĝia aŭtoro; kaj vere mi ne konis lin; mi pensis, ke oni bezonas pretekston por lin viziti en lia hejmo. Baldaŭ mi trovis rimedon: mi iris al la Doktoro, por aĉeti kelke da unuaj esperantaj eldonaĵoj, kiujn li tiam ankoraŭ vendadis en sia loĝejo. D-ro Zamenhof akceptas la malsanulojn de la 4a ĝis la 6a horo, mi do venis tuj post la 6a. La atendejo, estis ankoraŭ plena kaj mi devis esti pacienca preskaŭ unu horon. Fine eliris el la kabineto la lasta paciento, kaj kun latanta koro mi prezentis min al la Majstro.

D-ro Zamenhof estis jam iom laca, sed eksciinte pri la celo de mia vizito, li tre afable akceptis min, kaj ni komencis esperante interparolon pri Esperanto. Mi konstatis kun plezuro, ke sen iu ajn peno mi komprenas ĉion; ĉu D-ro Zamenhof same facile komprenis min, mi ne scias, sed mi iom dubas, ĉar de mia konvertiĝo pasis apenaŭ unu semajno. La simpleco kaj natureco de la manieroj de l' Doktoro tute ĉarmis min; kun streĉita atento mi aŭskultis ĉiun lian vorton kaj mi decidis, ke mi pli ofte . . . aĉetos esperantajn broŝurojn kaj librojn. Je la 8a horo D-ro Zamenhof komencis oscedi. Timante, ke mi tedis lin, mi tuj lin adiaŭis kaj foriris. Mi ankoraŭ ne scias tiam, ke nia Majstro ĉiam kaj ĉie oscedas vespere; mi tion eksciis nur poste kaj mi trankviliĝis. “Bone,” pensis mi, “ne mi estis la kulpo.” Sed tute konsolita mi min eksentis nur dum la Dresdena kongreso: D-ro Zamenhof, tute ne indifera je “das ewig Weibliche”¹⁾, oscedis vespere, parolante kun fraŭlino Hedwig Reicher!²⁾

Mi daŭrigis miajn vizitojn, sed mi devas konfesi, ke ne ĉiuj kontentigis min. Traleginte unu propagandan broŝuron, la ekzercaron kaj kelke da noveloj, kaj tradukinte du rakontojn, mi venis al firma konkludo, ke diversaj reformoj estas absolute neeviteblaj en Esperanto kaj mi prezentis miajn proponojn al la Doktoro. Kun miro mi konstatis, ke li ne estas ravita kaj ke li ne volas akcepti ilin. “Terura

Novjara Donaco al via Transmara Korespondanto.

LA SUDA KRUCO por unu jaro.

Por Kvin Shilingoj ni Sendos ĝin.

kohservativulo," pensis mi, "mi ne plu diskutos kun li pri la reformoj; baldaŭ li komprenos sian eraron kaj bedaŭros, ke li ne adoptis pli frue miajn proponojn."

Mia esperanta biblioteko pli kaj pli grandigis, mi pli kaj pli intime ekkonis dum miaj vizitoj nian Majstron, ne nur kiel aŭtoron de Esperanto, sed ankaŭ kiel homon, kiel idealiston, kiel noblan viron, kiu ĉiam pensas pri aliaj kaj ĉiam forgesas pri si mem. En la 50a datreveno de lia naskotago, kun ĉiuj Esperantistoj mi sendis al li miajn sincerajn dezirojn de longa kaj feliĉa vivo kaj kunigis mian voĉon kun tiu de ĉiuj samideanoj en fiera aklamado: "Ecce homo!"—"Jen homo!")

1) citaĵo el la dramo "Faust" de Goethe: "la eterna virino."

2) la fama aktorino, kiu ludis la rolon de "Ifigenio" dum la prezentado de la dramo "Ifigenio en Taŭrido" de Goethe dum la kongreso en Dresdeno 1908.

PLIBELIGO DE MELBURN.

Priskribo de Melburno, fiere uzata de ĝiaj loĝantoj, estas "Mirinda Melburno, la reĝina urbo de la sudo." La komitato de la Urbdesegna asocio ĵus faris tre gravajn proponojn, kiuj, se oni efektigos ilin, faros el Melburno unu el la plej belaj urboj en la mondo.

La nuna Urbdomo estas proksima al la suda ekstremo de la urbo kaj okupas relative malgrandan lokon, inter tre valoraj negocaj sidlokoj, sed, ĉar la tendenco de la urbo estas kreski en norda direkto, oni nun proponas formovi la civitan centron pli norden, kie estas ampleksa spaco por grandaj konstruaĵoj kun ebleco utiligi la ĉirkaŭan spacon por ĝardenoj kaj kunvenejoj per la loĝantaro.

Alia tre interesa propono estas la starigo de terkultura zono. Tiu estos zono tri mejlojn larĝa ĉirkaŭanta la urbon. La plej proksima rando de la zono estos je distanco de ok mejloj de

la centro de Melburno. Nenia nova konstruaĵo estos permesata en la zono, krom tiuj necesaj por kulturaj celoj. La motivo estas malebligi ke Melburno farigu tiel vaste etendita kiel estas Parizo kaj Londono. Alia tre grava motivo estas, ke kiel rezultato de la establo de la terkultura zono, estos malkarigo en la prezoj de lakto, butero kaj ovoj.

La konstruo de granda artefarita lago, pluaj ludlokoj por infanoj, plibeligo de la maraj kaj riveraj bordoj ricevos la atenton de la komitato. La egale necesaj aferoj de trajna kaj trama konstruo, konstruo de ŝoseoj, plua kloaka sistemo kaj buĉejoj ne estos forgesitaj.

KRONIKO.

SYDNEY.—Tre sukcesa monato por Sidnejaĵ esperantistoj estis novembro. Krom bone aranĝita kaj efektiva programo de regule okazantaj paroladoj en la klubo, oni ĝuis piknikon kaj bonvenigis kelkajn vizitantojn el malproksimaj landoj.

Farigis tre interesa parolado pri "Kordaj Instrumentoj" de nia fervora samideano kaj vic-prezidanto, S-ro Edgar Pryke, kiu sperte klarigis la devenon, uzon kaj muzikan valoron de diversaj muzikiloj. Alia temo, "Korespondado" (kiu ĝenerale promesas esti "seka"), okazis du semajnojn poste, sed S-ro Victor Rutland parolis en tiel facila, konvena maniero, donante tute nepedagogiajn ekzemplojn kaj ŝercajn flankaĵojn, ke ĉiuj atente aŭskultis ĝis la fino.

Okazo de graveco estis la vizito de s-ro Maurice Hyde ("Delsudo") je 8a novembro. Trapasante Sidnejon post pli ol dujara restado en Nov-Gineo kaj vojaĝo en Oriento li mallonge rakontis kelkajn travivaĵojn, precipe akcentante la progreson en Esperantujo.

La Societo ankaŭ salutis s-ro Klariĉec kaj alian samideanon el

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
BONA ODORA SPIRO
BONA RIDO
BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Nov-Zelando ĉe la fino de la monato.

MELBURN.—Amuza kaj utila "traduka vespero," gvidata de Sinjorino Bigelow; la membroj tradukis lote elektitajn pecojn de bone konataj Anglaj versaroj.

Sinjoro Redfern faris interesan paroladon pri propagando, donante multe da utilaj konsiloj.

Agrabla riverfesto ĉe Studley-parko.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 29a novembro ni ricevis la jenajn sumojn:—B. A. Silk, 1/-; A. R. Cohen, 15/-, ĝis decembro, '24; Mr. Serpell, 4/6, septembro, '24; W. McPherson, 4/6, septembro, '24; A. Bassett, 4/6, septembro, '24; J. B. Henry, 4/6, majo, '24; E. D. Nesbet, 4/6, oktobro, '25; A. R. Cohen, 4/6, majo, '24; L. I. Carthew, 2/3, marto, '24; A. Bennet, 4/6, oktobro, '24; J. Vodanović, 7/6, junio, '25; Persista Grupo, 5/6, aŭgusto, '24; Iru Antaŭen grupo, 5/6, aŭgusto, '24; N. Biagioni, 5/-; Carnegie grupo, 5/6, aŭgusto, '24; G. Lamond, 4/6, oktobro, '24; G. Benson, 5/-; aŭgusto, '25; O. H. Weselman, 5/-, oktobro, '24.

FILIIGITAJ GRUPOJ.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso, "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Australasia Esperanto-Asocio. Sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Renkontejoj (Melburna sekcio), Hardware Chambers, 250 Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunveno kaj poŝta adreso: ĉe F-ino. P. Ab-

bott. "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick. Ĵaŭde je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Society.—Prezidanto, S-ro. Alfred Gregory. Sekretario, S-ro. R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunveno: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno Eaton-Bray-lernejo, Davey St., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford, Sekretaria kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

"Iru Antaŭen"-Grupo. Prezidantino: S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Kunveno kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Mooray St., Murrumbena, (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) Ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey, Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Kunvenetoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. Ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro. H. Byatt, Sekretariino: F-ino. I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta.—Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunveno: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne..